

The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL° VIII. N-RO 89.

MAJO, 1912.

PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO.—*En Granda Britujo*, a frankite: por unu jaro, 3 ŝilingoj; unu numero, 3 pencoj.

Eksterlande, a frankite: por unu jaro, \$0.75, fr. 4, M. 3; laŭ internacia mono, Sm. 1.50.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komencigo de ĉiu monato, kaj devas esti pagataj per poŝtmandato aŭ Ĉekbanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, 133-136, High Holborn, London, W.C.

REDAKCIO.—Manuskriptoj, k.t.p., oni volu sendi al la Redaktora Komitato, 133-136, High Holborn, London, W.C. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certigi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendadas artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.—Pri anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, 133-136, High Holborn, London, W.C.

ENHAVO.

	Pago.
International Activity	81
Esperanto Progress Abroad	82
International Red Cross Conference	83
William Thomas Stead	84
Parolo de Carlyle pri Dante. ARTHUR GRAY	84
La Konverto de Abunasas. F. O. ZOCHER	85
Eta apologio post kelkmonata forlaso. LE LYS	86
La Larmoj. EDUARDO GACKI	87
La Militŝiparo kaj la Paco. W. M. PAGE	87
Batalhimno Esperantista. JOHN TAYLOR	88
Learners' Corner. M. C. BUTLER	88
Princo Kopassis	88
Chronicle	89
Pri verkoj rekompencotaj de la Akademio	92
Resumo de l' Kroniko.—Translation Page	93
Generala Organizo de la Esperantistaro	94
Libraro kaj Gazetaro	95
The 8th Esperanto Congress, Cracow	97
Fifth British Esperanto Congress	98
Poŝta Kesto	99
Council Meeting, B.E.A.—List of Guarantors	99
B.E.A.—Candidates for Membership, Examinations, F.K.I., etc.	100

International Activity.

No better argument for the utility of the auxiliary language could be found than the following list of some of the world's congresses from April to October this year. Of the thirty-three gatherings named, however, only the Esperantist ones will enjoy the facilities of monolingual discussions, the others having to hamper their proceedings by the use of three or four languages, often imperfectly understood by a majority of the Congressists. When will these learned bodies begin to use the admirable means of intercommunication and inter-organisation which lies ready to their hand in Esperanto? Happily there are increasing numbers of Esperantists among the members of many of them, and it is only a matter of a few years before Esperanto will take its rightful place in their deliberations. Facts *must* convince at last!

April 7th to 14th.—Twenty-Sixth International Congress of Orientalists, at Athens.

April 11th.—Seventh International Congress on Tuberculosis, at Rome.

April 13th and 14th.—Congress of the Esperanto Federation of the Paris District.

April 15th to 19th.—Congress of Experimental Psychology, at Berlin.

April 22nd to 25th.—Third International Congress of Construction and Public Works, at Rome.

May 5th to 8th.—Second International Congress of Householders, at Berlin.

May 7th to 17th.—Ninth International Conference of the Red Cross, at Washington.

May 26th to 28th.—Twenty-Fifth International Congress of New Philology, at Frankfurt/O.M.

May 26th to 28th.—Fifth Congress of British Esperanto Association, at Portrush.

May 26th to 28th.—International Concourse of Music, at Paris.

May 26th to 28th.—Fifth Congress of Danish Esperantists, at Vejle.

June 4th.—Conference on Wireless Telegraphy, in London.

June 4th to 11th.—Eighteenth Conference of Y. M. C. A., at Helsingfors.

June 28th to July 1st.—Sixth Federation Gymnastic Festival, at Prague.

July 16th to 22nd.—Thirty-Second Federal Festival, at Neuchatel.

July 22nd to August 10th.—Sixth International Course of Commercial Progress, at Antwerp.

July 27th to 31st.—Congress of German Esperantist Association, at Dantzig.

August.—International Mathematical Congress, at Cambridge.

August.—Twenty-Third Eucharistic Congress, in Vienna.

August 3rd.—International Catholic Congress, and First Hungarian Esperanto Congress, at Prague.

August 6th to 12th.—Seventeenth International Congress of Medicine, in London.

August 11th to 18th.—Eighth International Congress of Esperantists, at Cracow.

August 22nd to 27th.—Second International Congress on Moral Education, at The Hague.

September 6th.—Congress of the International Association for Testing Building Materials, at Washington.

September 18th.—International Congress of Americanists, at The Hague.

September 4th.—International Marian Congress, at Treves.

September.—International Congress of Anthropology, at Geneva.

September 6th to 13th.—International Congress of Applied Chemistry, at Washington and New York.

September 9th to 12th.—International Congress on the History of Religions, at Leyden.

September 10th to 12th.—Seventh General Meeting of the International Union for Law Workers' Protection, at Zurich.

September 22nd to 29th.—International Congress of Hygiene and Demography, at Washington.

September 24th to 28th.—International Congress of Chambers of Commerce, at Boston.

October 16th to 21st.—International Congress of the History of Art, in Rome.

April to September.—Bavarian Exhibition, in Munich.

May to October.—Anglo-Latin Exhibition, in London.



Esperanto Progress Abroad.

Italy.—The Italian propagandists have at last succeeded in overcoming the scepticism of the public, and the movement is now progressing well. Some months ago the King of Italy received in audience Mons. Edmond Privat, the Swiss Esperantist. His Majesty showed keen interest in the matter, and in the course of half-an-hour's conversation with his visitor asked many questions as to the language and the remarkable way it is spreading throughout the world, and assured him that Esperanto might count on his appreciation and approval. The Minister of Education, Mr. Credaro, also assured Mons. Privat that our movement should have his support. An important society, "Itala Esperanta Kooperativo," has been founded at GENOA (*Salita Pollaiuoli 13*) for the publication of Esperanto textbooks and propaganda literature. It has just issued a first edition of 100,000 booklets showing the easy construction and simple vocabulary of Esperanto. Further publications are being prepared by the new society, which is undertaking the sale of Esperanto literature throughout Italy. Another important society in GENOA, due to the enthusiastic labour of Dr. Stromboli, is the "Liguria Instituto de Esperanto," which has the support of the public educational authorities. Several courses of instruction are flourishing under its auspices in public schools by permission of the Genoa Corporation. The local group, "Genova Esperanto-Unuiĝo," owing to the growing interest of the public, has moved to newer and more commodious premises—*vera Esperanta hejmo*—where quite a number of *samideanoj* from other lands have been welcomed. The Genoese are already laying the preliminary foundations of the Ninth World Esperanto Congress, to be held here in 1913, and every Saturday a public lecture is given on Esperanto history or literature. Good work is also being done in SAMPIERDARENA (where the group is provided with a meeting place free of charge by the Corporation), RIVAROLO, TORNIGLIANO, in all of which places the Ligurian Esp.-Institute has organised lectures and classes in the public schools. Among other towns where the movement is making good way may be mentioned BORDIGHERA, S. REMO, BOLOGNA, MILANO, RIMINI, TORRE PELLICE, PALERMO, and VERONA, where the third Italian Esp. Congress is to take place this summer. Evidently the *Itala Esperanto-Asocio* can look forward with confidence to a season of busy and beneficent work.—*Per C. GIUSEPPE.*

Germany.—In reviewing the Esperanto movement in Germany for the past month, mention must be made of the *examinations*, which were held this year at Easter in various public schools in which Esperanto is being taught to children. These Esperanto examinations now have their place as a matter of course in the ordinary official school examinations, and were quite a success, especially in schools in DRESDEN, DOHLEN, and SCHONAU-CHEMNITZ. These examinations presented a good opportunity for discussing the introduction generally of Esperanto into the schools, and in the *Saxon Parliament* Dr. Steche moved that Esperanto be

taught as an obligatory subject in public high-schools, another member proposing that Esperanto be taught at least as an optional subject in the elementary schools. That the Saxon Government is not unfavourably inclined to such propositions is shown by the fact that in the *Royal Saxon Stenographic Bureau* are now being held classes in Esperanto shorthand (Gabelsberger-Schramm system).—On Feb. 25 a big meeting was held by the *Saxon Esperanto League* at ZITTAU, and on March 16–17 by the *Bavarian League*. Considerable propaganda is being made, with most encouraging results, by the *Students' Esperanto Centre* in BERLIN.—On the occasion of the Congress of German higher-grade teachers in DRESDEN recently, a special meeting was arranged by the *Academical Esperanto League*, the very large attendance proving the great interest now being taken in the auxiliary language in educational circles.—At BAMBERG, Govt. Post-Inspector Reber lectured on Esperanto in the examination hall of the Senior Postal Board. Many postal employees, men and women, were present, among them the senior postmaster of Bamberg, who at the end of the lecture expressed his cordial approval of our language. This event will certainly help forward Esperanto among postal officials, who have been joining in good numbers the *International Postal Employees' League* and the *German Postal and Telegraph Officials' Union*.—The *Esperanto Railway Officials* are also keenly at work, and have lately issued an invitation to colleagues abroad to take part in special meetings at DRESDEN, on June 15 and 17, when the National General Congress of middle-grade railwaymen is to take place.—Active preparations are already being made for the *German Esperantist Congress*, which will take place on July 27–31 next, at DANZIG-ZOPPOT, and progress to be in no whit behind previous annual gatherings of the G.E.A. Esperantists from abroad who have time to spare would find the festival an agreeable prelude to the main Congress at Cracow.—*Per J. KARSCH.*

France.—By the time this number appears the Annual French Esperanto Congress will be a thing accomplished. We will give details next month.—At PARIS there took place in January, at the "Bourse du Travail," before a large audience of workers, a discussion on the comparative merits of Esperanto and Ido. Esperanto was most energetically represented by Prof. C. Aymonier. Thanks to his brilliant and successful defence on that occasion, Esperanto will now be able more easily to make its way in labour circles, where propaganda was previously being made for Ido.—The recently founded international society, "Zamenhofa Artista Adeptaro" (Z.A.A.), organised successfully two charming entertainments entirely in Esperanto. Groups wishing to get new and interesting items for their winter programme would do well to communicate with the hon. sec., S-ro H. Van Etten, 10, rue Vivienne, Paris.—Three new Esperanto classes in connection with the *Red Cross* have been started, at PARIS, LYON, and BEAUVAIS.—During February was established the E.S.F.L., i.e., *French Esperanto Socialist Assn.*, with which English "kamaradoj" should get into touch. Address: 49, rue de Bretagne, PARIS.—From April 1–15 was held the first *Esperanto Commercial Exhibition*, at 51, rue de Clichy.—On March 28 an enthusiastic article on Esperanto was published in the well-known Paris daily, *Le Journal*, by the popular French writer, Mons. Victor Marguerite.—Among meetings recently held were: Feb. 27, lecture on the various musical settings of the Esperanto hymn "L'Espero," under the auspices of the Verda Stelo Club in Montmartre; March 29, Annual General Meeting of the Paris Esperanto Group; March 3, an important propaganda festival at CREIL (Oise), with reception by the Mayor, six hundred persons present, among them the local M.P.—At Easter

the annual congress of the French South-Western Esperantist Federation was held at BORDEAUX, with a delightful excursion to ARCAÇON as a wind-up. Among the congressists was the vice-mayor of Bordeaux.—*Per L. BOLLACK.*

Hungary.—Vigorous preparations are now being made for the Third International Congress of Esperantist Catholics, which is to be held next August at BUDAPEST, under the patronage of Cardinal Prince Claudius Vaszary, primate of Hungary, and of Archbishop John Csernoch. A strong local organising committee has been formed, among its members being prominent representatives from high clerical, scientific, political, and Esperanto circles. President of the committee is Canon Dr. Alexander Giesswein, member of parliament, president of the Hungarian Esperanto Society, of the Hungarian Pacifist Society, and of the National Educational Council. Dr. Giesswein was a prominent figure at the First Universal Races Congress held last year in London, when he was one of the signatories to the resolution passed in favour of the auxiliary language. His active co-operation augurs well for the success of the Esperanto Catholic celebrations, now being planned. An elegant Esperanto guide-book to Budapest will be ready shortly, and any information as to the Congress may be obtained from the Hon. Sec., *Dr. Cyrillo Voröss, Budapest IX., Ullői ut 59.*

Esperanto and the Red Crescent.—In a notice recently issued by the Saxon Government asking for volunteers for an auxiliary expedition to be sent out to the seat of the Turco-Italian War, in response to an appeal from the *Turkish Red Crescent Society*, among the qualifications recommended for applicants is the following item:—"A knowledge of foreign languages is required, especially of French and the auxiliary language Esperanto." This is an interesting evidence of the way Esperanto is now being taken as a matter of course in official quarters.

Shanghai.—*The North China Daily News* of 1st March reports a lecture on Esperanto in Shanghai by Mrs. C. E. Couling, a member and diplomitino of the British Esperanto Association, who became acquainted with the language during a visit to Edinburgh a few years ago. Rev. C. E. Darwent, who presided, urged that Esperanto should be used on the Siberian railway. Mr. Liu, a member of the Chinese Esperanto Association (several members of which were present), briefly spoke in Esperanto of its advantages, and argued that for Chinese it is the key to the European languages, as English was much easier to learn through the medium of Esperanto. Mr. Strumensky announced that the International Institute approved of the language, was going to use it in correspondence with non-English-speaking countries, and meant to open an Esperanto class for foreigners, as well as for Chinese.



The Ninth International Red Cross Conference.

This will be held in Washington, D.C., from May 7 to 17 next. It is the first of these quinquennial conferences to assemble in the United States, and the American Red Cross is devoting special efforts to make it a success. Our colleague, *Amerika Esperantisto*, has an interesting article on the Conference from an Esperantist point of view.

"At these Conferences the various Red Cross associations of the world are represented by delegates, and most of the civilised countries send governmental delegations as well. The general purpose of international Red Cross conferences is, of course, the extension of the humane work of this wonderful association. In this all Esperantists are doubtless interested, as the dividing lines between countries offer no obstacle

to Red Cross activities. Moreover, the work of the Red Cross specially interests Esperantists everywhere, for Esperanto, because it knows no country, becomes at once a natural means of communication to the widely scattered Red Cross associations whose officers and members speak many different languages."

[In this connection it will be remembered that the American Red Cross has repeatedly shown its appreciation of the services to be rendered by Esperanto, by sending government representatives to the annual Esperantist World-Congresses.—*Red.*, B. E.]

"What Esperantists have already done to make easy communication possible between belligerents and allies in war is doubtless known to many of our readers. Not only might misunderstandings leading to war often be prevented if nations had a ready means of communication such as is afforded by Esperanto, but the horrors of war might also be mitigated to a considerable extent. Without reference to this subject further except as it affects the Red Cross, how readily suffering would be prevented in war if nurses and physicians were able to communicate quickly and surely with their patients and fellows who speak a foreign tongue!

"Ten days, a much greater amount of time than has ever before been devoted to the purpose, will be occupied by the sessions of the Conference. During this period all matters affecting Red Cross associations will be fully discussed. Very probably much more time than usual will be spent on the peace activities of the Red Cross. The American Red Cross, even if smaller in the number of its members and funds as compared with other associations, has been foremost in disaster relief in peace. More than \$5,000,000 have been disbursed in such relief since our Red Cross was reorganised in 1905. First Aid to the Injured will also be given a prominent place on the programme. For our Red Cross, appalled by the number of deaths and injuries from accidents, has a first-aid department, and is engaged in teaching this subject throughout the country. One of the innovations it has made in this respect has been the employment of railroad cars for instruction purposes. Two such cars are now in commission for the railroads, and in the seven others first aid is taught to miners in connection with the Bureau of Mines. Still another active department of our Red Cross is the nursing department, in which are now registered more than two thousand trained nurses who are instantly available for disaster or war.

"There will also be a great Red Cross exhibition in connection with the Conference. This will consist of two parts, a general section to comprise exhibits by the Red Cross associations of the various countries and articles submitted by individuals for use with sick and wounded in campaigns. The other section will be exclusively devoted to the Marie Feodorovna Prize Competition. Prizes aggregating \$9,000 for certain specified apparatus to alleviate the sufferings of ill and injured in war will be awarded in the competition by an international jury.

"The Esperanto Association of North America will participate in the former exhibition. Space has already been reserved for this purpose. It is expected their exhibit will consist of literature showing how useful Esperanto can be made in Red Cross work. Leaflets on this subject will also be distributed to visitors.



Shakespeare on the Esperantistaro.—"Their encounters, though not personal, have been royally attorneyed with interchange of gifts, letters, loving embassies, that they have seemed to be together though absent, shook hands as over a vast, and embraced, as it were, from the ends of opposed winds. The heavens continue their loves."—*The Winter's Tale, Act I., Sc. I.*

WILLIAM THOMAS STEAD.

En la momento, kiam ni preparas la nunan numeron de nia Gazeto, la numeron de la gaja maja monato, alvenas al ni sciigo pri la plej terura katastrofo de la maro. La "Titanic," la plej granda kaj luksa ŝipo en la mondo, en sia unua vojaĝo, pereis kun si portante al la morto 1,600 el siaj 2,300 pasaĝeroj kaj maristoj. Por la Esperantistaro la katastrofo estas aparte dolora, ĉar sur la ŝipo estis W. T. Stead, unu el la vicprezidantoj de la Brita Esperantista Asocio, kaj Stead inter pli ol mil sescent kunvojaĝintoj eniris maran tombon. Tiu ĉi kruela bato de la sorto estas ankoraŭ pli terura pro sia subiteco, ĉar oni adiaŭtis lin fortan kaj ĝojplenan malpli ol unu semajnon antaŭe, kaj ĝis la lasta momento komunikis kun li per senfadena telegrafo. Apenaŭ ni scias skribi tiun ĉi nekrologion kaj apenaŭ povas kredi, ke nia multestimata samideano estas ja forrabita al ni; sed vana estas la espero, ke la lasta sciigo trompas nin.

W. T. Stead naskiĝis en la jaro 1849 kaj unue laboris en la oficejo de komercisto. Dum juneco li komencis verki artikolojn por la ĵurnalo *Northern Echo* kaj gajnis reputacion tian, ke en lia dudekunua jaro oni elektis lin redaktoro. Poste li fariĝis redaktoro de la ĵurnalo *Pall Mall Gazette*, kaj en la jaro 1890 fondis la *Review of Reviews* revuon tre konatan de la Esperantistaro pro ĝia ĉiama fervoro por nia Afero. Kiam Esperanto alvenis en Anglujon antaŭ dek jaroj, Stead estis unu el la plej agemaj subtenantoj de la nova lingvo, kaj tuj de tiu momento li energie helpis la movadon kaj kuraĝigis la unuajn lernantojn en Anglujo. Ni tre bone memoras la tempon en la jaro 1904, kiam okazis granda kunveno en Londono por starigi nian Asocion. S-ro

Stead prezidis, kaj lia tiama parolado plena je vortoj de espero kaj kuraĝo entuziasmigis ĉiujn kaj donis al ni certigon pri la ekvivo de nia Asocio kaj la sukcesa estonteco de la Movado en nia lando.

De la momento, kiam naskiĝis nia Asocio Stead neniam lasis preterpasi okazon por helpi nin. En la unua jaro de nia vivo, estis Stead, kiu senpage provizis oficejon, estis li, kiu garantiis nian financon, estis li, kiu en sia propra revuo, kaj per diversaj artikoloj ofte reklamis kaj rekomendis nin en la publika gazetaro. En la komenco li fariĝis vicprezidanto kaj ĉiujare la membroj, memorante liajn grandajn servojn, reelektis lin. Ve, ke ni devas skribi subite pri la morto de tia nekomparebla amiko!

La personeco de Stead estis altira; por ĉiu li ĉiam havis afablan vorton; al neniu li rifuzis helpon aŭ konsilon. Pro la diverseco, sentimeco, kaj neordinareco de liaj multaj skribaĵoj, malamikoj kredeble ne mankis al li, sed ĉiuj konfesos, ke li skribis, parolis kaj agis sincere kaj honeste laŭ sia konvinko. En sia profesio li estis unu el la plej eminentaj membroj, ĉion scianta, ĉion komprenanta, intima kun, Imperiestroj, Reĝoj kaj Ŝtatprezidantoj egale kun la plej malriĉaj kaj malaltrangaj personoj. Antaŭ ĉio, li estis fervora laboranto por la Mondpaco, kaj la rezultato de liaj senĉesaj klopodoj por la bono starados antaŭ ni, kiel lia monumento.

Al lia ploranta parenkaro ni transdonas la konsolon kaj kondolencon, kiujn sinceraj esprimoj povas porti. Tre bone ni scias, ke la perdo, terura por ni, sendube estas por ili milfoje pli dolora. Estu komforto en la konvinko, ke li mortis pace, kaj ke tiu grandanima, varmkora kaj pia homo adiaŭtis la mondon kun preĝo kaj rideto sur la lipoj.




Parolo de Carlyle pri Dante.

Multajn volumojn oni verkis kiel komenton pri Dante kaj pri lia verko; tamen sen granda rezultato. Lia biografio estas al ni perdita kvazaŭ por ĉiam. Pri li — sensignifa, vaganta, dolorfrapita homo — oni ne atentis multe dum lia vivado; kaj la plimulto da tio, kion ni iam sciis pri li, malaperis dum la longa tempo, kiu intervenis. Jam forpasis kvin jarcentoj de tiam, kiam li ĉesigis verkadon kaj vivadon tie ĉi. Malgraŭ ĉiuj komentarioj, estas precipe per lia Verko ke ni konas lin...per lia Verko, kaj — oni povas

aldoni — per tiu Portreto, kiun oni komune kredas pentrita de Giotto, kaj kiun rigardante oni perforte inklinas kredi aŭtentika, de kiu ajn pentrita. Al mi, tio estas plej kortuŝanta vizaĝo; eble la plej kortuŝanta el ĉiuj vizaĝoj, kiujn mi konas. Sola tie, ĝi vidiĝas, pentrita kvazaŭ sur malpleno, kronita de simpla latro; kun senmortaj malĝojo kaj doloro; kun la konata Verko, kiu ankaŭ estas senmorta — plena de signifo pri la tuta historio de Dante. Mi opinias, ke ĝi estas la plej malĝoja

vizaĝo, kiun iam oni pentris laŭ originalo; tute tragedia, kortuŝanta vizaĝo. Estas en ĝi, kvazaŭ ĝia fundo, dolĉeco kaj mildeco; amo dolĉa kiel tiu de infano; sed ĉio ĉi kvazaŭ glaciigis en akran kontraŭon, en mem-neniigon, en izolecon, en fieran, senesperan doloron. Dolĉa, nebula animo elrigardas tie tiel severa, nepardonema, kvazaŭ ĝi estus entenata de densa glacio. Tio tamen estas silenta doloro; silenta, mokema doloro: la lipoj estas fieraj pro dia malestimo pri la afero, kiu formangadas la koron — kvazaŭ tio estus malestiminda, sen-signifa afero; kvazaŭ tiu, kiun ĝi kapablas turmenti kaj mortusufoki, tamen estus pli granda, ol ĝi. Tio estas vizaĝo de homo, kiu protestas sen ĉeso kaj batalas sen cedo dum vivlongo kontraŭ la mondo. Ĝia amo fariĝis plene indigno; nepardonema indigno, malfacile ekscitebla, silenta kiel la indigno de iu dio mem. La okuloj ankaŭ elrigardas iel surprizitaj, demandemaj, — *Kial la mondo estas tia?* Jen Dante; tia li ŝajnas al ni, tiu "voĉo de dek silentaj jarcentoj," kaj tiel li kantas al ni "sian mistikan, nekomprenoblan kanton."

Tradukis ARTHUR GRAY.



La Konverto de Abunasas.

Originalaĵo de FRANK O. ZOCHER.

UNUA ĈAPITRO.

Abunasas Rabisto.

La Francoj nomis lin Brigando. Li nomis sin Abunasas rabisto, reĝo de la Saharo. Kiel reĝo, aganta laŭ reĝa maniero, li postulis impostojn de la karavanoj traveturantaj la dezerton.

La karavanoj vole-nevole pagis, ĉar Abunasas, kiam la dolĉaj argumentoj ne sufiĉe rapide efikis, tre bone sciis apliki pli trafajn, kaj eĉ frapajn argumentojn. Reĝo Abunasas ridetante enpoŝigas la impostojn, plej afable kaj senpage donas necesajn informojn kaj konsilojn al la karavanoj kaj reĝmaniere forsendas ilin.

La plendoj pri la monpostuloj pli kaj pli multigis, tial ke la franca registaro serioze pridiskutadas rimedojn por ĉesigi la brigandadojn de Abunasas. Post longa prikonsiligo, la registaro decidis sendi al Abunasas ambasadoron kun jena oficiala propono:

La franca registaro garantias plenan pardonon al Abunasas, kaj proponas al li profitegan oficon, kondiĉe ke li forlasu la Saharon, kaj konsentu loĝi en Franclando.

Jen la respondo de Abunasas:

Al la plej honorinda kaj potenca registaro de Franclando!

Mi Abunasas naskiĝis en la Saharo, en la Saharo mi vivas, kaj en la Saharo mi mortos. Mi estas ja vera infano de la sabla oceano, mi amegas mian patrolandon, tial neniam kaj neniel mi konsentos vivi ekster ĝi.

Ĉe ni ne ekzistas subpremantoj nek subprematoj. Miaj regatoj estas feliĉaj, kaj ĝuas la plej grandan liberecon.

Mia sorto estas intime interplektita kun la sorto de mia popolo. Kun ili mi estas feliĉa, kun ili mi restos.

ABUNASAS, REĜO DE LA SAHARO.

Ĉi tiu aroganta respondo ekstreme kolerigis la francan registaron, kaj ili tuj decidis sendi militistaron kontraŭ tiun eksterleĝan brigandon.

Tamen inter la sendo de militistaro, kaj la kaptado de nekaptibla rabisto, estas granda diferenco.

Abunasas, per siaj informantoj, baldaŭ sciigis pri ilia intenco, kaj senprokraste preparis bonegan bonvenon por la enpenetrantoj. Dum ventega nokto, Abunasas kun siaj kunuloj, tute neatendite falis sur la francajn senditojn, kaj forprenis ilian tutan provizon de nutraĵo. Nun la Francoj trovis sin en tre kriza situacio. Kion fari? Sen nutraĵo, malproksime de ĉiu vilaĝo aŭ urbo, restis al ili nur unu sola rimedo, humile peti nutraĵon de la malestiminda eksterleĝulo, alie morti pro malsato kaj soifo.

Abunasas bonkore redonis al ili sufiĉe da nutraĵo kaj akvo, por ke ili povu atingi la plej proksiman francan militpostenon. Do Abunasas lasite trankvile de la francoj, pli bele daŭrigis siajn rabagojn, je granda malŝato de la karavanoj.

Denove la plendoj tiele multigis, ke la franca registaro devige decidis ĉesigi por ĉiam la rabadojn de Abunasas. Ili do sendis pli grandan militistaron kontraŭ Abunasas, kaj por pli instigi la fervoron de la virĉasantoj, promesis premion de 25,000 frankoj al tiuj, kiuj kaptos (vivan aŭ malvivan) la rabiston.

Abunasas aŭdinte pri la granda honoro al li farita, meditadante gratas al si la kranion, frapetas al si la nazon, kaj fine ĝojege kunfrotas siajn manojn. Li jam eltrovis rimedon por kapti la multvaloran premion, promesatan de la franca registaro.

Nu, kion faris Abunasas por akiri al si kaj siaj kunuloj la dezirindan monsumon? Eble vi pensas, ke li mem liveris sin al la Francoj?

Se vere vi pensas tion, kara leganto, vi ja estas simpla naivulo. Abunasas faris nenion tian. Li konas siajn klientojn. Li bone sciis, ke la franca registaro honeste pagos al li la promesitan sumon, kaj poste laŭ francaj leĝoj mortpafos lin kaj konfiskos lian tutan posedadon. Ne, li simple ludis la rolon de timulo, kaj ĉiam forkurante, allogis la Francojn pli kaj malproksimen al lokoj plenaj je danĝeroj por fremduloj. Tie li ataketis ilin ĉiumomente, malhelpis al ili trovi akvon, kaj ne lasis ilin dormi nek ripozi, tiel ke post mallonga tempo, la Francoj terure laciĝis pro manko de nutraĵo kaj ripozo. Dum unu nokto, kiam blovegis la terura siroko*

* *Siroko* estas sabla ventego, kiu pereigas multajn homojn kaj bestojn.

fariĝis facila por la nelacigebla Abunasas kapti la tutan francan militistaron. Por ke Abunasas reliberigu siajn militkaptitojn, la franca registaro pagis vole-nevole (certe ne bonvole) al li, la promesitan monsumon. Abunasas en plej bona humoro kondukis la Francojn ĝis la norda limo de la Saharo, reĝmaniere adiaŭtis ilin dirante: "Ne forgesu doni miajn respektplenajn salutojn al viaj estroj."

Tamen Abunasas jam estas maljuniĝanto kaj eble pro tio fariĝas pli prudenta. Post longa meditado pri siaj pasintaj aventuroj kaj la estonteco, li decidis fari praktikan kaj honestan proponon al la franca registaro.

Li proponis, libervole ĉesigi siajn rabistajn agojn, kondiĉe ke la franca registaro siaflanke garantiu al li, leĝe, oficiale, kaj por ĉiam, la nepridiskuteblan posedon de malgranda, bone difinita landeto, kuŝanta en la mezo de la Saharo. La franca registaro trovis ĉi tiun solvon de la malfacila problemo tiel malkara, ke ĝi tuj kaptis la okazon kaj senprokraste sendis ambasadoron kun favora respondo al Abunasas.

La plej famaj leĝistoj preparis la dokumentojn, plene garantiantajn la postulojn de Abunasas. La ŝtatministroj subskribas siajn nomojn, kaj fine la reĝo mem almetas sian reĝan sigelon.

Tiel finiĝis la Reĝeco de Abunasas, kaj la unua ĉapitro de mia rakonto.

DUA ĈAPITRO.

Abunasas Honestulo.

Kompreneble ĉi tiu novaĵo fulmorapide disvastiĝis ne nur tra Franclando, sed ankaŭ tra la tuta civilizita mondo. La francaj ĵurnaloj mirege kaj favorege komentariis la aferon. *La Gazette de la Bourse*, en longa artikolo sur la antaŭa paĝo nomis Abunasas'on "nia saĝa, honesta amiko."

Le Temps, ĵurnalo oficiala, nomis lin "nia nova amiko, nia potenca vasalo," k. t. p.

La Croix, ĵurnalo Katolika, publikigis kromfolion pri la influo de nia sankta religio, pri la pieco kaj preskaŭa sanktuleco de Abunasas.

Nur la socialistaj ĵurnaloj ridindigis la tutan aferon, dirante, ke Abunasas maljuniĝante fariĝas malsaĝulo. Entute, ĉiuj ŝajne estis kontentigitaj. Precipe la komercegistroj, kiuj jam kalkulas la ceterajn profitojn enpoŝigitajn. Kaj Abunasas ja havis kaŭzon esti pli kontentigita mem ol la aliaj ĉiuj kune. Li ja fariĝis sendependa bienulo, kvazaŭ aŭtokrata princo en sia propra landeto. Gratuloj kaj bondeziroj el ĉiu lando kvazaŭ pluvegis sur lin. Eĉ la aninoj de la pariza klaŝfraŭlina klubo faris al li edziĝproponojn (kompreneble ĉiu aparte kaj sekrete). Abunasas ekridegis kaj — ne akceptis.

Jen la miljara regno alveninta. La karavanoj neturmentate kaj laŭplaĉe traveturas la Saharon kaj ofte estas eĉ helpataj per konsiloj de la eksrabistoj. En la mezo de la Saharo, akvo estas tre malofta, kaj por akiri ĝin, kompreneble, oni faras viziton al Abunasas.

Abunasas plej afable akceptas la vizitantojn, petas informojn pri ilia farto, pri la sano de la edzino, kaj de la karaj infanoj, kaj vendas akvon al ili je tre alta prezo. La komercistoj, kompreneble, energie protestas kontraŭ ĉi tiuj novaj kaj neantaŭviditaj impostoj. Tamen Abunasas restas nefleksebla. Mi, kiel vi, li diras, estas komercisto, vi vendas viajn komercaĵojn, mi vendas la miajn. La miaj estas akvo kaj fruktoj. La karavanoj kontraŭvole pagas kaj denove plendas pri la novaj friponaĵoj de Abunasas tamen la kontrakto estas laŭleĝe konkludita kaj tial nenuligebla. Honesta Abunasas pli kaj pli riĉiĝas, kaj, pli kaj pli afabliĝas...

Tamen la senmova kaj paca vivado baldaŭ malplaĉis al la nelacigebla eksreĝo, sed reveni al la antaŭa vivmaniero estas pro honoro kaj precipe maljuneco nefareble. Abunasas, ne estante malinteligenta, baldaŭ trovis elirejon el ĉi tiu rustigejo. Li metis siajn bienon kaj rajtojn en la manojn de ia financakcia kompanio, fariĝis nome ĝia ĉefa direktoro kun tre alta salajro, kaj transmetis la devojn de la administracio al la subdirektoroj. Malgraŭ la patriota aserto iam farita, ke li neniam konsentos vivi ekster sia patrolando, li dum multaj jaroj travojaĝis la diversajn eŭropajn landojn, ĝis fine li definitive fiksiĝis en Parizo. Tie li mortis je la aĝo de preskaŭ cent jaroj. Lia mortema restaĵo estas enterigita en la belega tombejo, nomata Père Lachaise.

Kara leganto, kian Abunasas'on vi preferas? Ĉu la rabiston? Ĉu la komerciston?



Eta apologio post kelkmonata forlaso.

Ĉu eble vin forlasi — floreto kvinpetala?

Forlasos ĉu abelo la mielon —

Ĉu lumo ĉesos flirti kun gemo purkristala —

Ĉu ĉesos alsopiri ni Ĉielon?

Laseti for — ni povas; sed nepre ni revenos;

Forflugas eĉ l' abelo for de l' floro;

Ĉu *lipa* nekontakto forgeson kun si trenos —

Forglitos iam amo el la koro?

"Centoble ne" — mi kantas; la kanton ĉiu
'bis'os;

Floreto kvinpetala — ĉiam floru;

Ĉar kiu jam vin kisis — vin nepre ja rekisos;

Mielon por elĉerpi, li laboru.

LE LYS.

La Larmoj.

El okuloj, spegulo de homa animo, la larmoj fluis. Oftaj, helaj faladis guto post guto. Kaj ŝajnis al la homo, ke ĝi krias per tuta forto al mondo, sed ĝiaj lipoj estis kunpremitaj kaj ĝi silentis, forte kunpremante la dentojn. La mondo ŝajnis terura, malplena, kvazaŭ subtera kaverno... Malhela ŝtona plafono sufokis, premis la muroj kaj gaja eĥo revokadis voĉon neelveninte el la brusto ĝi enfalis koron per malpeza sento.

Homo, kie estas via potenco, forto de la spirito? Doloro fandas diamanton de via animo kaj nobla metalo elfluas el la okuloj, por, ekbrilinte dum momento en sunradioj—morti, por, malsekiginte la polvon—kusiĝi apud via piedo kiel akva makulo. Kaj poste, poste vi mem piedstaros ĝin kaj aliaj homoj forportos per botoj vian trezoron.

...Per ŝtala kiraso kovru vian bruston, per propra mano prenu vian doloron, jetu ĝin en flaman animon por akceptu ĝin la fajro kaj kristaligu ĝin kiel diamanton. Tiel perla konko, portinte en si mem dum longaj jaroj doloron, naskas puran perlon—ornamaĵon de reĝkronoj.

Sub la sarg'o dolora, rompiĝas spirito kiel piko sub blovo de l'vento. Spirito via penetrita per malforto—mortas... Viajn okulojn doloro ŝirmis,—malbono verŝis maldolĉan galon en koron kaj premas la gorg'on.

Malgaja vi estas, ĉagrena, mizera

Dum sufero vi estas sola, sola kiel tombo sur stepo. Tial Vi bezonas pli multe da potenco.

El bjelorusa^o lingvo tradukis EDUARDO GACKL.



Kiel la Vilaĝano Trompis la Diablon.

(Litova fabelo).

Iam unu vilaĝano konatiĝis kun la diablo kaj baldaŭ ili ambaŭ estis jam amikoj. La diablo havis ĉirkaŭ cent rubloj da kapitalo. La vilaĝano sciis pri tio kaj petis la diablon prunti ĉi tiun monon al li "ĝis morgaŭ," promesinte eĉ iom da procento. La monavida diablo tuj konsentis kaj alportis al la vilaĝano la petitan monon. Ĉar la vilaĝano ne sciis skribi kaj la mono estis pruntita sen atestantoj, la vilaĝano proponis, ke la diablo mem skribu sur la muro per la karbo ke la vilaĝano pagos al la diablo pruntitan monon "morgaŭ." La sekvintan tagon la diablo venis por ricevi la monon, sed la vilaĝano, montrante sur la muron, diris:

"Sinjoro diablo, tie ja vi mem skribis, ke mi devas redoni al vi la monon *morgaŭ*. Bonvolu veni morgaŭ. La diablo, kompreninte, ke li faris malsaĝaĵon, foriris kaj revenis la sekvintan tagon, sed la vilaĝano ree montris al li surskribaĵon sur la muro. La kompatinda diablo ĝis hodiaŭa tago venadus al la vilaĝano ĉiam "morgaŭ," se la ruza kamparano ne mortus post kelkaj jaroj ne redoninte ankoraŭ al la diablo la monon.

Esperantigis D. JERMOLIN.



(Por Komencantoj).

La Militŝiparo kaj la Paco.

Al sia patro, Joĉjo diris unu tagon:

— Paĉjo, kio estas porpaca militŝiparo?

— Porpaca militŝiparo, mia knabo, estas militŝiparo, kiu estas sufiĉe granda kaj potenca por konservi pacon, respondis Smithers.

— Kiel ĝi povas konservi pacon, paĉjo?

— Ĝi povas minaci kaj subpremi aliajn militŝiparojn.

— Ĉu Usono devas havi porpacan militŝiparon?

— Tute certe, Joĉjo.

— Ĉu Granda Britujo devas havi porpacan militŝiparon?

Smithers hezitis.

— Ĉu...ĉu vi ne deziras ludi kun via nova aeroplano?

— Ne, paĉjo... Ĉu Granda Britujo devas havi porpacan militŝiparon?

— Jen, Joĉjo, tiuj knaboj ĝuas belajn ludojn tie. Forkuru kaj ludu kun ili.

— Mi tute ne volas eliri nun, paĉjo... Ĉu ĉiu nacio devas havi porpacan militŝiparon?

— Vi ne estas sufiĉe matura por kompreni tiajn aferojn, diris la pliaĝa filozofa. — Ne ĝenu min.

— Nu, paĉjo, se alia militŝiparo atakus nian militŝiparon kaj ni subpremumus ĝin; ĉu tio estus konservo de la paco?

— Jes.

— Kaj se la alia militŝiparo estus pli granda kaj potenca, kaj subpremumus la nian, ĉu tio estus konservo de la paco?

S-ro Smithers tute ne aprobis la instigon al scivolemo en infanoj, kaj li severe ordonis, ke Joĉjo silentu...

Proksiman tagon, Joĉjo fiere anoncis al la patro, ke li konservis pacon kun Jaĉjo Jones.

— Kiel vi ĝin faris, mia knabo? demandis la patro, rimarkante nigretan kontuzon sub la okulo de la junulo.

— Nu, respondis Joĉjo; — mi estas pli granda kaj pli potenca ol li, do mi provis unue minaci lin, sed li frapis min, kaj post tio mi subpremis lin.

El "New York Times" tradukis W. M. PAGE.

* La Bjelorusoj estas nur leviganta nacio, kvankam ĝi estis tre granda slava raso. Ilia literaturo havas siajn specialajn ecojn, t.e. malgajecon kaj apatian rezignecon, kiun kaŭzis la longa premado de fremda registaro. Tamen en bjelorusa literaturo estas tiel multe da poezio vera, ke ĝi faras grandan impreson.


Batalhimno Esperantista.

Kantu, ho fratoj, laŭte kaj ĥore :
 "Vivu l' Esperantismo !"
 Regu nin sole, dolĉe kaj kore,
 La amo...ne l' egoismo !
 For la malamo, diable kreata !
 For la milito de tio kaŭzata !
 Venu la paco, de ni dezirata
 Dank' al l' Esperantismo.

Antaŭeniru, sankta afero !
 Vin salutas la homoj.
 Flugu, malpacoj, al la infero !
 Vi fariĝos nur nomoj.
 Semu la semon de mondsimpatio,
 Esperantistoj el ĉiu nacio !
 Ĝermos la floro je tempo de Dio
 En la koroj de l' homoj.

Vivu do Zamenhof ! Vivu la bela
 Lingvo internacia !
 Brilu surtere, per lumo pli hela,
 Amo dolĉa kaj dia !
 Jen la benaĵo de homoj ŝatata,
 Jen la afero de gentoj celata,
 Jen la premio de ni atendata :
 PACO INTERNACIA.

JOHN TAYLOR.

**Learners' Corner.****THE ACCUSATIVE ENDING N.**

RULE : THE ACCUSATIVE (N) REPLACES AN OMITTED PREPOSITION.—It is usually explained as denoting either (I.) the direct object of a verb, (II.) direction (motion towards something), or (III.) duration, date, time, price, weight, measure, etc. These, however, are all special cases of the general rule.

I. DIRECT OBJECT.—The object of a verb is said to be "indirect" if it is preceded by a preposition, e.g., *mi dankis (fidis, flatis, helpis, instruis, kredis, obeis, pagis, plaĉis, sekvis) al li* ; *mi memoras (aŭdas, forgesas, kantas) pri li*. The indirect objects **al li** and **pri li** may be replaced by the direct object **lin**, the letter "n" in "lin" replacing the omitted preposition "al" or "pri."

Unlike the student of French or English, the Esperanto student has not to learn with each verb whether its object must be direct or indirect, for both forms are good ; he may equally well say *li diris al mi* (said to me) or *li diris min* (told me). He can say *li vidis al mi*, *por mi*, *pro mi*, or *pri mi* ; but if these prepositions do not express his meaning, or if they are too precise, he may use the less definite **je**

mi, or *min*. This is always possible, even when national custom differs, e.g., *mi vidis lin (= al li or je li)*, *mi aĉetis pomon (= je pomo)*, etc. Note that "je" should be used only when no other preposition meets the case ; it expresses indefinite prepositional relation, and, like the suffix -UM, derives its meaning from its context.

II. DIRECTION (ALMOVO).—The same explanation holds good here also, e.g., *mi veturis Romon* (or **al-Romo**). He wandered (about while he was) there : *li vagis tie*. He wandered (from elsewhere) to-there (thither) : *li vagis al-tie* or *li vagis tien*. I ran (being) in-the-house : *mi kuris en-la-domo*. I ran (from elsewhere) **to** in-the-house (=into the house) : *mi kuris al en-la-domo*, or *mi kuris en-la-domon*. *Li saltis sur-la-tablo* : (when he was) on-the-table. *Li saltis sur-la-tablon (= al sur-la-tablo)* : he jumped (from elsewhere) **to** on-the-table (on to the table).

N.B.—Prepositions in Esperanto always govern the nominative case. When (like "en" and "sur" in the last examples) they are followed by the accusative, this shows the omission of some *other* preposition (here "al").

N.B.—The accusative of *Almovo* is never used after "al" or "ĝis," because these words themselves imply *almovon*.

III. DURATION, ETC.—In every case it may be shown that a preposition is omitted, and replaced by -N. *Si parolis la tutan tagon (dum la tuta tago)*. *La 2^{an} (en or je la 2^a) de Marto*. *Mi estas tri paŝojn (je tri paŝoj) de la morto*. See Cox's Commentary, 68, for further examples.

It is not advisable to have two direct objects after one verb, as this may cause ambiguity. Thus *mi prezentis ŝin vin* might mean "I introduced you to her," or "her to you." One (or both) of the direct objects should be made indirect. Thus *demandu lin tion* should be *demandu lin pri tio* or *demandu al li tion*.

The student may with profit similarly correct in two ways each of the following sentences :—*Li instruis min Esperanton ; li sciigis la novaĵon la unuan de Aprilo ; li pardonis nin nian ofendon ; petu Dion helpon ; kredis min tion*.

M. C. BUTLER.

(To be continued).

**+ Princo Kopassis. +**

Ni bedaŭras anonci, ke mortis la 22an de Marto, inside pafita de iu alilandulo, la honora Prezidanto de la Samos'a Esperantista Societo, Princo Reganto Andreo M. Kopassis. La malĝoja okazo kaŭzas grandan pardon al la insulaj samideanoj, ĉar lia Princa Moŝto estis fervora subtenanto ne nur patrone, sed ankaŭ aktive de Esperanto, kiu estas devige instruata en ĉiuj publikaj lernejoj de lia regno.

Chronicle.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th.

COMING EVENTS.

Esperanto Day at the White City.—Saturday, June 15th. —If each individual Esperantist will do his part, we are going to see a record gathering of the clans in London this year. Whispers are in the air of a huge Esperanto procession to be organised for 1913, but before we can think of undertaking such an enterprise as that we must first justify the attempt by a proof of more enthusiasm than is visible among British Esperantists at present. Familiarity sometimes breeds contempt, but it more often engenders indifference, and it behoves each one of us to bestir ourselves if we would see our hopes realised. A great deal might be done at these yearly gatherings in London to attract public attention if we unite in sufficient numbers.

Everything possible under the circumstances will be done to make the week-end attractive.

Fuller details of the arrangements will be given in the June journal, but in the meantime federation and group secretaries are urged to make this known to their members, and to send to me any suggestions and assurances of support. It would greatly strengthen our hands if we could have in advance some idea of the numbers we may expect. Will the group secretaries kindly note this?—*For the Organising Committee,*

GEO. W. COX.

(III.). Por esti enskribita en tiujn listojn, ĉiu grupo aŭ societo de propagando devas peti tiun enskribon, sendante al la Centra Oficejo, formulon laŭ la modelo ĉi poste aldonita.* Ĝi devas ankaŭ aboni Oficialan Gazeton, ĉu senpere, ĉu per unu el siaj anoj, laŭ la kondiĉoj fiksataj de tiu Gazeto, por ricevi ĝustatempe ĉiujn informojn kaj avizojn pri la Esperanta movado.

Ĉiu enskribita grupo aŭ societo devas ankaŭ informi, kiel eble plej baldaŭ, la Centran Oficejon, pri la ŝanĝoj, kiuj okazas en ĝia estraro, sidejo, k.t.p.

(IV.). Al ĉiu grupo aŭ societo regule enskribita, la Sekretario de la Konstanta Komitato de la Kongresoj sendos, sufiĉan tempon antaŭ la Kongreso, specialan formulon laŭ la modelo ĉi poste aldonita,† por la elekto de la Rajtigataj Delegitoj de la grupo aŭ societo.

Tiu formulo montros la nombron de anoj, kiuj grupiĝis por la pago de la fiksita kotizo por pravigi la nombron de la elektitaj delegitoj.

Post enskribo de la nomoj kaj adresoj de la elektitaj delegitoj, tiu formulo devas esti subskribita de la prezidanto de la grupo aŭ societo, laŭ regulo 3-a de la Aldono al la Regularo por atesto de la elekto.

Ĝi povas esti, ĉu resendata al la Konstanta Komitato de la Kongresoj, ĉu prezentata al la kongresa urbo, al la oficistoj komisiitaj por kolekto kaj kontrolo de la elektoj.

Ĝi devos esti akompanata de pago de la sumo, kiu reprezentas la opan kotizon de la elektintaj anoj, se tiu sumo ne estis jam antaŭe sendita.

(V.). Ĉiujare, la opa kotizo pagota por la elekto de ĉiu delegito reprezentanta 25 elektintajn anojn, estos fiksita de speciala decido de la Administra Komitato de la Centra Oficejo, kaj publikigita sufiĉan tempon antaŭ la kongreso.

(Vidu aldonitan decidon por la Oka Kongreso).

Decido de la Komitato pri la fiksado de la kotizo pagota de la elektantaj anoj de ĉiu grupo aŭ societo, por elekto de la Rajtigataj Delegitoj sendotaj al la Oka Kongreso.

(I.). Laŭ la Regularo por la sendo de Rajtigataj Delegitoj al la Universalaj Kongresoj de Esperanto, la opa sumo pagota por ĉiu aro de 25 elektintaj anoj estas fiksita por la oka kongreso (Krakovo 1912), je unu spesmilo (2.50 frankoj).

(II.). La sumo pagota por la rajto de enskribo de ĉiu grupo aŭ societo kun abono al *Oficiala Gazeto* dum unu jaro estas fiksita je du spesmiloj, ordinara abonprezo de tiu Gazeto.



Libraro kaj Gazetaro.

Antaŭen kun Kredo!—*Literatura Jarlibro de "Pola Esperantisto" por 1911.* (Varsovio: Eldono de Jan Günther).—Tiu ĉi kolekto de artikoloj, noveloj kaj poemoj estas tipe pola. Ĝenerale la stilo estas viva kaj bonega, eĉ kiam nesimpla. La unua artikolo, titolita "Historiozofo de Lingvo Internacia" estas unika en tio, ke kvankam la enhavo estas verkita laŭ scienca tono kaj per sciencaj terminoj, la lingvaĵo estas mirinde bone kaj trafe manipulita. Neniuj krom slavo povas ĝis nun fari tiel kun Esperanto! Ĉe romanlingvano tia artikolo estus senviva, peza kaj disfalanta en sensignifon. La dua peco, "Mia Poŝhorloĝo," estas rakonto pri knabo, kiu dum longe havis—nehavis poŝhorloĝon. Nur kiam ĝi estis palpebla li plene vivis: kiam li ne havis la trezoron li sopiradis kaj malzorgis la lecionojn. Fine, kiam la patrino, malriĉiginte, devis "lombardi" la poŝhorloĝon, la knabo apenaŭ povis toleri la vivon.—Notinda estas la serio de poemoj de *Antoni Lange*, tradukitaj de A. Grabowski, kiuj trafe prezentas la kernon kaj spiritan esencon de la grandaj religioj de Moseo, Buddho, Zaratuŝtra, Jezuo kaj Mahometo. La pola aŭtoro de tiuj samaj poemoj mem tradukis el la sanskrita originalo unu rakonton ("Nalo kaj Oamayanti.") Tre kontente ni legis en la volumo alian novelon ("La Ĝemo de la Vivo") de *Elisa Orzeszko*, la aŭtorino de "Marta." Se oni dezirus katalogi erarojn el la libro, estus eble citi kelkajn, k. ekz.: "estas lia devo amuzigi [amuzi] min; "nevelkebleco" [p. 112—la sufikso *eb-* kutime estas uzata nur ĉe transitivaj verboj], "bindilo" (p. 128) anst. bindaĵo, sed tio estus maldanka, kiam oni ricevas tiom da delikataĵoj. La libro trae elspiras slavan odoron... kaj inter la slavoj, la ĉefaj majstroj de Esperanto, ja staras eminente la poloj, ĉu ne?—P.J.C.

Dek-spesdeka Biblioteko Esperantista, eldonita de la Esperanto-Propaganda Instituto, Lindenstr. 18, Leipzig. Jam aperis ses numeroj, reprezentante en oportuna poŝformato diversajn konservindajn artikolojn, kiu antaŭe aperis en gazeto. Jen la interesaj temoj belstile traktitaj: (1) *Parolado de D-ro Zamenhof* en Washington, (2) *Propraj Nomoj en Esperanto*, de Prof. P. Christaller, (3) *Libro de kan'oj* de Heinrich Heine, esperantigitaj de D-ro L. L. Zamenhof kaj aliaj famaj Esperantistoj, (4) *Esperanto kaj Ido*, trad. laŭ G. Gautherot de L. E. Meier, bonega kaj nepre "kadavriga" batalilo kontraŭ Idistoj, (5) *Vidaĵoj de Senlivo*, de Prof. M. Finot (scienca traktato pri la misteroj de la universo), kaj (5) *Gentoj kaj Lingvo Internacia*, memuaro prezentita de D-ro Zamenhof ĉe la Unua Universal Raskongreso en 1911—parkere sciinda de ĉiu propagandisto! Ĉiu Esperantisto devus nepre posedi la broŝurojn de tiu malkara serio.

* Vidu p. 338 de *Oficiala Gazeto*, Marto 25.

† Vidu p. 33 de *Oficiala Gazeto*.

Portreto, rakonto de N. V. Gogol, trad. D-ro Andreo Fiŝer (Presa Esperantista Societo, 85 paĝoj, 1ŝ 3p. afr.).—Simpla vorto: portreto — sed ligita kun la nomo Gogol ĝi promesis ion neordinaran, kaj ni komforte instaligis por bona regalo. Kaj efektive, jen ni havis! Tuj nin kaptis la sorĉo de l' verkinto, tenis, tenadis, avide legantan, ĝis la plej lasta vorto de l' fina paĝo. Potenca rakonto, vere! La portreto, sciu, ne estas tia, kian oni vidas ĉiutage — sorĉita ĝi estas, kaj havas ĉe si forton pereigan por ĉiu, kiu malbonŝance fariĝas ĝia posedanto. Ĝi prezentas "maljunulon kun bronzkolora konsumita vizaĝo kaj elstarantaj vangostoj, kun la trajtoj fiksitaĵ en momento de ia konvulsia ekmoŭvo," sed kio plej frapas en tiu jam ne tro bela vizaĝo estas la okuloj, kiuj per la lertegeco de la artisto simple rigardas, rigardadas, rigardegas kiel vivaj el la portreto mem kaj samtempe eksentigas al la rigardato "ion malagrablan kaj nekompreneblan." Tiun misteran bildon trovas en butikado tute hazarde iun tagon juna en mizero vivanta pentristo Ĉartkov, aĉetas por dudek kopekoj, kaj... jen ekdisvolviĝas la fatalo. Tiun saman nokton lin vizitas terura premsongho pri lia nova aĉetaĵo, profetante la ŝajnan bonŝancon, kiu lin trafas la morgaŭan tagon. Kiel li ekiras la vojon de malbenanta fortuna, fariĝas famulo, kaj puŝate de la terura veinfluo de la bildo nepre marŝas renkonte al la fina perejo, vi sendube volos legi por vi mem... Survoje vi ricevos ankaŭ nombron da utilaj instruoj pri esencaj punktoj de la arto ĝenerale. Al la intereso de la rakonto mem aldoniĝas la ĉarmo de neordinare viva Esperanta stilo, riĉa je multaj lertaj kunmetitaj vortoj. Nur ni ne tro ŝatas la oftan uzon de *eki* kaj *adi* kiel memstaraj vortoj.—Z.

La Espero, muzikalmetoj.—(1). *De Henri Coppet*, 179, Boulevard Periere, Paris (Francujo). Prezo 75sd. (2). *De Wolfgang Schaumburg*, Genevo (Svisujo). Ankorau du novaj melodioj por la konataj vortoj! Kion ni povas diri pri ili? Vere, mi tre preferas la pli simplan arion de la Esperantista Kantaro (recenzita en nia Aprila n-ro), kaj mi ne povas ŝati multoblajn alfarojn; ili konfuzas la muzikan spirito, kiu serĉas la povon edzigi poemon kaj melodion neŝangeble. El la du mi preferas tiun de Coppet, kiel pli glatan. (Notu gravan preteraron en la unua mezuro: al la dua D mankas la b). La ario de Schaumburg, kvankam ne malĝuste akcentita, estas tamen ne perfekte proporcia al la ritmo de la vortoj. Ĉu aliaj vortoj ne povus esti trovataj por ĝi, pli konformaj al la muziko?—E.L.Y.

Alvoko, vortoj de G. C. Cox, muziko de O. F. Fenner, Pionira Librejo Esperanta, 135, Sellincourt-road, London, S.W (Anglujo). Prezo, 3p.—La saman kritikon kiel supre ni povus ripeti pri tiu vigla kaj bonsona "Alvoko." La frazo "Jen aŭskultu" ne devas tiom akcenti la *Jen*, la forta akcento apartenas al la silabo *kult*. Simile por "De la glora," k.c. Krom tiu tro forta "De," la rekanto, kiu estas la plej valora parto, svingas tute ritme, kaj certe gajnos aprobon.—E.L.Y.

Parizina, de Lord Byron, el la angla poezio esperantigis D-ro Venancio da Silvo (Paris: Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède).—Ĉu la poemo de Byron meritus esti transskribita en prozo, mi ne scias: la originalon mi ne legis. Tamen, lasante flanken kelkajn disputeblajn esprimojn, la libreto estas skribita en flua kaj meze ĝusta stilo. Ke ĝi ne estis tre zorge redaktita, montras la jenaj ekzemploj: "glaciumus la senton" (p. 9) estas uzata anstataŭ "glaciĝus," kiu ankaŭ aperas, kaj "gvardioj" anst. "gardistoj" aŭ "gvardianoj." Jen aliaj frazoj: (p. 12) "Vi vidis min flanken [? flanke, aŭ al (ĝis) via flanko, laŭ la signifo] tute ruĝa de sango tra la batalo, nek foje viaj sklavoj..." "tian objekton kian [bia] mi" p. 13).—NORÉMAC.

The Passing of Babel, by Bernard Long, B.A. (72 pp.; crown 8vo.; price 6d. net). This is a book probably unique in the whole collection of Esperanto literature, and yet, strange to say, having the book before us, it seems to be the very first essential of any systematic attempt in propaganda work. The book describes the origin, spread, and present utility of Esperanto, and contains much cleverly considered argument as to the use of the language in different spheres of activity such as Commerce, Science, Travel, Literature, and Education. The marshalling of the facts and general information is so well done, and the author's literary style in parts so eloquent, that the book may be read straight through from cover to cover as a tale. No one who takes part in debates, indulges in newspaper correspondence, gives public lectures, or in any other way strives to make our language known should be without a copy. Different opponents have different objections to Esperanto, and even to an International Language; but the book before us provides answers to all, and it is for this reason we recommend our propagandists to study it carefully and to use it often in the course of their work.

The type used is of the clearest, the paper excellent, and the coloured design of the cover compels attention in such a way that one may reasonably expect the enquirer's appetite for the rest of the feast to be sensibly whetted by such delectable *hors d'œuvre*.

La Revuo (Aprilo).—En ĉi tiu numero ni ricevas la du unuajn ĉapitrojn de "Nombroj" (Numbers), el la Biblia traduko farita de nia Majstro. Jen kelkaj rimarkoj kaj komparoj: *prikalkulu* la tutan komunumon de la Izraelidoj (take ye the sum of all the congregation of the children of Israel)—ĉiuj virseksuloj *laŭkape*. De la *aĝuloj* de dudek jaroj kaj pli (every male *by their polls*. From twenty years old and upward)—*Tio* estas la *distingitoj* de la komunumo (These were the *renowned* of the congregation)—kaj la kunvenintoj *legitimis* sin laŭ siaj familioj (and they (those assembled) *declared their pedigrees* after their families)—Sed vi *komisiu* al la Levidoj la *tabernaklon de atesto*...kaj ili *priservu* ĝin (But thou shalt appoint the Levites over (*entrust to*) the tabernacle of testimony...and they shall *minister* unto it).—Inter aliaj artikoloj troviĝas: "Fragmentoj el verkoj de Oscar Levertin," sveda literaturisto, tradukitaj de John Lundgren; "La Niŝan ĉe la barilo" de Ferid Maglajaiĉ, ĉarma amrakonteto el la kroata lingvo tradukita de D. Vojkoviĉ; "Babiluro" de C. Aymonier; "Nord-Amerikaj Indianoj," fragmento el "History of the United States" de Holmes, tradukita de M. J. Gartner; "Ĉu teknika aŭ komuna estas la jura lingvo" de Marcel Laignier kaj la kutima "Babilado" de C. Bourlet.—E.A. "

Aliaj Verkoj ricevitaj.—*Gentoj kaj Lingvo Internacia*, de D-ro L. L. Zamenhof. Represo de la memuaro verkita de la Majstro por la Unua Universala Raskongreso. N-ro 6 de la 10-spesdeka Biblioteko Esperantista, 3p. Bonega verko, traleginda kaj pripensinda por ĉiu Esperantisto.—*Klarigo pri Unitaria Kristanismo*, de R. A. Armstrong, B.A., trad. A. J. Hulme, E.V.K., 1½p. afr. ĉe la Brita kaj Alilanda Unitaria Asocio, Essex Hall, Essex-street, Strand, Londono.—*La Kulturo*, organo de la Bohema Laboristaro Esperantista en Aŭstrio. Gazeto ĉiumonata, kiun legos kun intereso ĉiu samideano interesata je la disvastiĝo de Esperanto inter la laboristaro. Petu specimenon ĉe S-ro R. Sada, knibarstvi, Praha II., Lipova 8.—*Sepa Universala Kongreso de Esperanto*. Plena raporto Oficiala, kun nomaro de la kongresanoj kaj protokoloj de la Fakaj Kunsidoj, k.c., eld. de la Centra Oficejo, zŝ. 6p. afr.—*Bad Nauheim*, hektografita priskribo en Esperanto pri la mondfama banurbo. Havebla kontraŭ poŝtkarta peto ĉe S-ro Ed. Forster, sek. de la loka Esperantista Grupo.

VIIIa Universala Kongreso Esperantista.

Krakovo, Aŭgusto 11—18.

Fervoja rabato.—La klopodoj de la Komitato ĉe la Ministro por fervojaj aferoj ne restis sen sukceso. La ministerio konsentis doni al la kongresanoj rabaton sur ĉiuj aŭstriaŝtataj fervojoj dum unu semajno antaŭ la kongreso kaj unu semajno post la kongreso. Ĉar la Komitato deziras ricevi ankoraŭ pli favorajn kondiĉojn, ol tiuj, kiujn la registaro jam donis, ĝi faras pluajn klopodojn en tiu rilato.

Honora Kongreskarto.—Por la karto Nro. 1, kiu (vidu la duan cirkuleron) estos atŭckie vendota, oni proponas jam 12 Sm. Tiun lastan proponon faris unu konata angla samideano. Kiu proponos pli multe?

Albumo de Kongresanoj.—Detalojn pri tiu projekto trovas la legantoj en nia plej proksima numero. Ni atentigas, ke ĉiu kongresano *nepre devas sendi* sian fotografajon.

Ekspozicio.—Ni ree faras varman alvokon al ĉiuj eldonistoj, aŭtoroj, grupoj kaj izolaj esperantistoj, ke ili helpu la ekspozician sektion per alsendo de libroj, broŝuroj, muzikaĵoj, cirkuleroj, afiŝoj kaj ĉiuspecaj aliaj dokumentoj. Ĉiuj objektoj estos zorge konservataj kaj tuj resendataj post la 30 de aŭgusto. Adreso de la ekspozicia sekcio estas: *S-ro Benedikto Herold, Lwow, Potockiego 22, Austrio-Galicio.*

Protestanta diservo.—Diservo por protestantoj okazos en la protestanta preĝejo. La predikon en Esperanto faros pastro Karol Michejda, estro de la Krakova protestanta komunumo.

Jubilea Festvespero.—La vesperon organizas S-roj Drodowski, Barabasz, Kalinowski kaj Walewski, profesoroj de Krakova Muzika Konservatorio. Ĉi tiu fakto certigas al la vespero altan, vere artistan nivelon.

Ekspozicio de pola arto.—La ĉi tiea "Societo por belaj artoj" instigita de la Organiza Komitato, preparas por la kongresa semajno, en sia palaco, specialan ekspozicion de pola pentr- kaj skulptarto. La surskribo kaj katalogoj estos redaktitaj en Esperanto.

Aligoj.—Al ĉi tiu numero estas aldonitaj aliĝiloj, enhavantaj utilajn informojn pri loĝado, manĝado, kongresaj eldonaĵoj, k.t.p. La ĝisnunaj, provizoraj aliĝintoj estas insiste petataj sendi la kongresan

kotizon, ĉar alimaniere ili perdos la rezervitan al ili numeron de la kongreskarto.

Vegetarana restoracio.—Konsiderante la fakton, ke inter la esperantistoj troviĝas sufiĉe multaj vegetaranoj, la Komitato faris kontrakton kun vegetarana restoracio, kies mastrino kaj servistaro parolas Esperanton.

Interesa ekspozicio.—La "Landa Industria Ligo" en Galicio, instigita de la Komitato, decidis konatigi la kongresanaron kun tre originalaj, nenie aliloke renkonteblaj produktoj de pola hejma industrio. Tiucele la Ligo aranĝos speciale por la kongresanoj, konforman ekspozicion kun klarigoj, informoj, surskriboj, k.t.p., en Esperanto. La direktoro de la citita Ligo, S-ro Krzaczyński, mem studas nian lingvon, dezirante fari dum la Kongreso lumbildajn paroladojn en Esperanto.

Distraĵoj.—La Krakova "Teatro de Novaĵoj" preparas esperantan prezentadon kun gaja varietea programo. Ne mankos do humorplenaj monologoj, kupletoj kaj burleskoj — ĉio kompreneble nur en Esperanto — ĉar la direktoroj de la teatro, S-ro Polenski kaj Pilarski, intence lernas nian lingvon kun sia tuta personaro.

Fakaj kunsidoj.—Ĉiuj fakaj societoj, intencantaj aranĝi dum la Oka siajn kunsidojn, estas insiste petataj komuniki al la Komitato siajn dezirojn, ĉar oni devas rezervi al ili necesajn ĉambrojn. La lasta neprokrastebla templimo por tiuj avizoj estas la 1 de majo.

Suplementaj kartoĵoj.—Oni malkomprenis la regulon pri suplementaj kartoĵoj. Ne ĉiuj familianoj *kune* pagas Sm. 3, sed ĉiu aparte *po* Sm. 3.

Propraj nomoj.—Plenigante la aliĝilojn oni ne esperantigu la nomojn de la urbo, strato, sia nomo, k.t.p., ĉar tio estas tute malĝusta kaj kaŭzas konfuzon ĉe la postoj, kiam la Komitato skribas al la aliĝintoj laŭ simile redaktita adreso.

Tabelo de distancoj.—El multego da urboj ni ricevas riproĉojn, ke ni ne konsideris tiujn urbojn en nia tabelo. Se ni volus en la tabelon enmeti ĉiujn urbojn, en kiuj estas esperantistoj, ni devus eldoni dikvoluman libron. En la tabelo ni konsideris ne la naciajn aŭ esperantistajn, sed nur la fervojajn centrojn.

Alvoko.—Ni insiste petas, ke per frua aliĝado oni helpu kaj plifaciligu laboron de la Komitato.

LA ORGANIZA KOMITATO.



8a Internacia Esperanto Kongreso, Krakovo.

Prezoj de Biletoj de Londono ĝis Krakovo.

VOJO.	IRI.		IRI KAJ REVENI.	
	£ s. d.	£ s. d.	£ s. d.	£ s. d.
Hook, Rotterdam, Hanover, Berlin†	6 15 10	4 8 5	12 9 2	8 0 11
Flushing, Hanover, Berlin	6 15 10	4 8 5	12 9 2	8 0 11
Ostend, Cologne, Berlin	7 18 9	5 1 9	15 2 9	9 13 9
Calais, Cologne, Berlin	8 10 9	5 10 0	16 2 0	10 9 0
Harwich (ŝipe), Hamburg, Berlin	5 17 6	3 15 6	10 16 0	6 18 0
(ŝipe) Ostend, Cologne, Berlin	6 18 9	— — —	13 14 0	— — —
DE HULL.**				
(ŝipe) Hamburg, Berlin	5 10 0	*3 19 9	9 15 0	*6 14 6
DE LEITH.				
(ŝipe) Hamburg, Berlin	6 10 0	*4 19 9	12 4 0	*9 3 6

* 1a kl. ŝipe, 2a kl. fervoje.

Biletoj kaj plenaj sciigoj estas haveblaj ĉe la oficejoj de THOS. COOK & SON, Ĉefoficejo, LUDGATE CIRCUS, LONDONO (Filiigita al la U.E.A.).

Estas ankaŭ haveblaj biletoj de Londono kaj la ĉefurboj de Britujo al Belfast, kaj Coleraine, kaj tra ĉiuj partoj de Irlando.

** Tiuj, kiuj deziras vojaĝi al Cracow tra Hull, povas ricevi vojaĝinformojn ankaŭ de S-ro R. E. Vivian, 8, Stirling-street, Hull.

† La vojaĝo el Londono al Krakovo tra Hoek van Holland-Salzbergen estas pro tio tre oportuna, ke la vojaĝanto, provizita per rekta bileto Londono-Krakovo povas elekti aŭ rektan vagonaron kun restoracia vagono, veturante tra Hoek van Holland-Salzbergen-Berlino aŭ preni tiun de Hoek van Holland tra Roterdamo, Hago kaj Amsterdamo kaj en ĉiu el tiuj urboj, kiuj estas tre vidindaj, halti. De Amsterdamo oni povas daŭrigi la vojaĝon al Berlino per la internaciaj tag- kaj nokt-vagonaroj.

Fifth British Esperanto Congress.

Portrush, 25th—28th May, 1912.

TRE ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ,—

We are glad to be able to tell you that everything points to our having a very pleasant and successful Congress. The local arrangements are almost complete, and we believe they will ensure an excellent holiday to our visitors.

Official Recognition.—We are fortunate in having the honour of the support of His Excellency, the Earl of Aberdeen, K.T., G.C.M.G., C.V.O., Lord Lieutenant of Ireland, who has graciously accepted the High Protectorship of the Congress. Anthony Traill, Esq., LL.D., M.D., Provost of Trinity College, Dublin, has kindly become our Patron. Locally, the Urban Councils of Portrush and Coleraine have given us the use of their Town Halls free of charge, and will officially meet our members to bid them welcome.

Portrush.—Our Congress town is perhaps the leading Irish watering place, usually called the Brighton of Ireland. Its situation on a promontory, with the Atlantic on three sides, is unique, and its surroundings make it one of the most perfect holiday places extant.

Excursions.—Our excursions are to places of world-wide fame. The Giant's Causeway and Killarney are the two places in Ireland known by repute over the whole civilised globe. Glenariff in the north and Glengariff in the south are almost equally famous beauty spots, and our kongresanoj will see two of these four places without any further expenditure than the Congress subscription.

Meetings.—The Annual General Meeting of the B.E.A. will, of course, take place as in other years, and we are making provision for any sectional meetings that members may desire. Our Masonic visitors will receive a warm welcome from the local Freemasons, and we hope our proposal to work the Lodge entirely in Esperanto will have a high propaganda value. The churches will follow the excellent example set at the Leeds Congress, the Church of Ireland service being entirely in Esperanto and the Methodist partly in Esperanto and partly in English. The programmes of the evening meetings are not yet complete, but their aim will be propaganda rather than merely amusement, as we believe this will best please both the Esperantists and the "outsiders."

Railway Arrangements.—The local Railway Company (Belfast to Portrush) has given us exceptionally favourable terms, so that kongresanoj will be able to travel far more cheaply than would be possible for them at any other time.

The Congress Membership is evidently going to be large and representative. Here the coal strike interfered, and we had practically no applications during March. Now they are coming in most encouragingly by every post. But still there are a few members of the B.E.A. who have not joined, and we cordially invite these to do so quickly.

Important.—Members will require their coupons, etc., for the journey to Portrush, and must therefore have them before leaving home. As some time is required to make these up, we cannot guarantee them to members whose applications are received after 17th May. Similarly, vouchers for reduced fares cannot be guaranteed to Irish members whose applications are received after 12th May.

As we should say over here, "Take your Easter holidays at Whitsuntide." Come and help us to make the Congress the great success we so hopefully anticipate. Take advantage of the unique opportunity which now presents itself, and write for a Provisional Congress Card (enclosing 1s. 6d.) by the first post.

FREEMAN W. CROFTS, *Hon. Sec. of the Congress,*
Railway Station, Coleraine.

The Fifth British Esperanto Congress.

The Visit to Dublin.

Hotels Recommended.—*The Gresham* (headquarters), Upper Sackville-street. Tariff: Bed and breakfast, 5s. 6d. a day; full board, 9s. a day.—*Conarchy's*, No. 7, Rutland-square. Bed and breakfast, 4s. a day; full board, 6s. 6d. a day.—*College Hotel and Vegetarian Restaurant*, Nos. 3 and 4, College-street.

Wednesday, 29th May.—Arrival in Dublin. Public meeting in Dublin University at 8 p.m., by the kind permission of the Provost of Trinity College, who will preside. The President of the B.E.A. will deliver an address.

Thursday, the 30th.—Visit to places of interest in the city, leaving the Gresham Hotel (headquarters) at 10 a.m.—*Luncheon* at D.B.C. in Sackville-street at 1.30 p.m. After luncheon the visits will be resumed.—At 8 p.m. social evening in the Aberdeen Hall, Gresham Hotel. Light refreshments will be provided. Professor Randal Woodhouse has kindly undertaken to organise a concert for the occasion.—The visitors will be sent complimentary tickets, for which application should be made as soon as possible to the undersigned Hon. Sec.

Friday, 31st.—Visits to places of interest in the city and neighbourhood, with short alternative excursions, of which full particulars will be posted up in headquarters. N.B.—It would greatly assist the Reception Committee if intending visitors would, without delay, send an intimation of their intention to take part in the visit to Dublin to the Hon. Sec.,

CHARLES E. BLACKHAM,

14, Garville-avenue, Rathgar, co. Dublin.

The Journey to Portrush.

It is hoped that a party will leave St. Pancras on Thursday evening, May 23rd, for Belfast *via* Heysham. The departure will be at 6 p.m., the party arriving next morning at 6.15. This arrangement will enable members to take advantage of the excursion rate (31s. 6d., third-class return, London—Belfast, available for 16 days), and will allow a full day to explore the commercial capital of Ireland. Tickets and information as to other routes and fares may be obtained from Messrs. Thomas Cook & Son, Ludgate Circus, London, E.C.

Dr. Pollen, who will be with the above party, particularly desires us to express his earnest hope that a very large number of Saxon *samideanoj* will be present to support him at the first Esperanto Congress on Irish soil. Dr. Pollen wishes this to be taken as a personal appeal, as this meeting in his native land will be the last of a long series in many places held under his presidentship.

Al Fervojistoj Esperantistaj.

Okazos en DRESDENO, Junio 15—17, kongreso de la *Saksaj Mearangaj Fervojistoj*, en kiu partoprenos la plej altaj ŝtataj kaj la magistrataj oficistaroj. Tiu asocio deklaris sin preta enigi en la programon manifestacion de la Esperantistaj fervojistoj tutmondaj. Por ke ĉi tiu propagandaĵo bone sukcesu la Saksa sekcio de la Internacia Asocio de Esp. Fervojistoj direktas al ĉiuj samprofesianoj la koran peton, "oferi" por nia ideala movado kelkajn tagojn de sia ofte nur tre mallonga libertempo kaj partopreni la aranĝojn de l' saksa asocio. Intencitaj estas ankaŭ specialaj kunsidoj de la esperantistaj oficistoj por diskuti kaj konsiligi pri rimedoj por progresigi nian aferon pli energie kaj intense en administraciaj rondoj. Ĉiu fervojisto, kiu deziras kunhelpi, estas petata sciigi kiel eble baldaŭ sian partoprenon al S-ro Fervoja Asistanto JOH. ENGST, Dresden 29, Klopstockstr. 18. Detaloj pri la aranĝotajoj, k.t.p., estos poste komunikataj.

Potia Kesto.

Council Meeting, B.E.A.

Alvoko al Esperantistoj.—Moskva firmo "Posrednik" (Peranto) eldonas ĵurnalon "Majak" (Lumturo) en rusa lingvo por infanoj de 10-15 jara aĝo. En tiu ĉi ĵurnalo estis presita memlernolibro de esper. lingvo por infanoj; post tio multaj abonantoj de tiu-ĉi ĵurnalo demandis la redakcion pri adresoj de alilandaj esperantistoj per korespondado. Pro tio mi, kiel gvidanto de esperanta fako en tiu ĉi ĵurnalo, petas samideanojn, ke ili bonvolu sciigi min pri la adresoj de tiuj 10-15 jaraj *geesperantistoj*, kiuj dezirus korespondadi kun rusaj samagaj gesamideanoj; estas dezirindaj ankaŭ komunikajoj pri tio, pri kio oni deziras korespondadi. Tiuj ĉi adresoj estos regule presataj en ĵurnalo "Majak," certe, tute senpage.—N. KABANOV, *Ruslando, Moskvo, Neopalimovski, 12.*

Trege kaj tuj bezonata: Iu, kiu, jam konante Esperanton, bonvolus lerni la Braille-skribon, kaj donus kelke da horoj du-trifoje ĉiusemajne por helpi ĉe la Esperanto-Sekcio de la Incorporated National Lending Library for the Blind, Queen's-road, Bayswater, Londono, W.—Oni volu respondi al F-ino H. E. BOARD, 8, Stanley-gardens, W.

Konkurenuloj atentu!—La Germana Esperanto-Gazeto proponas 100 spemilojn por tri premioj pro la plej bonaj simplaj disertacioj, alsendotaj ĝis la 1a de Julio, 1912, pri (la nuna stato de teknikaj kaj populaj sciencoj). Temojn sendontoj petu per respondkuponon precizajn kondiĉojn, ĉe Germana Esperanto-Gazeto, Kaiser-Friedrichstr. 1, Magdeburg, Germanujo.

Postafero!—Samideanoj povas fari bonegan propagandon, se ili skribos al la Ĉefpoŝtestro en Londono protestante kontraŭ la difekto de poŝtkartoj ilustritaj per stampilo nuntempe uzata, kiu faras al la karto relsimilajn trapremojn. Se la plendoj laŭ la kutima "ruĝrubanda" metodo trapasos diversajn oficejojn ĝis la ĉefoficejo, nia afero ricevos bonan reklamon.—J. HOYLE, Halifax.

Okaze de la dana ĵerkunveno, kiu okazos Pentekoston en la urbo VEJLE, oni aranĝas ĉe la Granda Hotelo ekspozicion de Esperantaĵoj. La organizantoj tre petas, ke samideanoj britaj, kiuj volus ekspozicii—kaj ili estu multaj!—sendu la elmetotajn objektojn ĝis la 10a de Majo al la Sek., S-ro Martin Boezk, Tannes-gade 4, VEJLE, Danujo.

Kidonistoj, konigu vian gazeton!—En la granda Bavara Metia Ekspozicio, kiu okazos en München dum la tuta somero 1912, la Esperantistoj aranĝos oficejon kaj legejon, en kiu estos elmetataj la novaj numeroj de esperantaj gazetoj ĉiulandaj. Ni do tre petas, ke ĉiuj eldonistoj bonvolu sendadi sian gazeton de majo ĝis oktobro al la ĉi suba adreso por tiu celo. Ili per tio helpos samtempe la propagandon de Esperanto kaj la diskonigon de sia gazeto.—CHRISTIAN PFEUFER, München, Schrandolphstr. 1211.

Preĵaj Floroj el Nice.—Kiu dezirus ricevadi je plej malkara prezo, per Esperanto, florojn el Nice por ornami sian domon kaj tablon, skribu al S-ro Direktoro de la SOCIÉTÉ DES FLEURS DE NICE, 2, rue Voltaire, Nice, Francujo.

Held at the offices of the Association on 15th April, 1912. *Present:* Dr. J. Pollen (chairman), Miss M. L. Blake, J. Bredall, J. L. Butler, M. C. Butler, P. J. Cameron, B. Chatterton, G. J. Cox, C. A. Fairman, Colonel W. A. Gale, F. A. Goodliffe, Miss L. S. Grant, Miss M. R. Henningsen, R. Holder, Miss C. M. Holmes, A. Honeysett, P. Kalisky, Miss E. A. Lawrence, B. E. Long, H. Bolingbroke Mudie, S. A. Perkins, R. Robertson, Miss A. Schafer, F. M. Sexton, A. Sharp, C. F. White. *In Attendance:* W. W. Mann, A. E. Wackrill, the Secretary.

Finance.—The Hon. Treasurer reported that there was a balance on current account of £117 8s 6d. It was decided that a further £50 be placed on deposit, making £100 in all. A statement of finances for the month of February was submitted to the meeting.

"British Esperantist" Committee.—A short report of the committee containing a summary of suggested changes in the form of the gazette was read to the meeting, and it was decided that the Committee be empowered (in conjunction with the Editorial Committee) to make such changes as they deem desirable in the form of THE BRITISH ESPERANTIST. Mr. Mudie stated that it was considered a small magazine in the form of an intermediate monthly brochure of about 16 pages, in English, containing mostly news, was needed as a link between the Groups and the Federations. On Mr. Mudie's suggestion it was decided that a letter should be sent to the Federations to ascertain their views, and to obtain promises of support.

Library.—Mr. Robertson reported that there was a considerable number of books in the Library which the Committee thought should be bound. Several books might be bound together, and he estimated the total number of volumes would be about 35. It was decided that the sum of 50s. be set apart for binding, Mr. Mudie kindly suggesting that the "Propaganda Kaso" might contribute a further £1.

Congress in Portrush.—A letter was read from Mr. Crofts giving some particulars as to the membership to date and the present state of the programme. In order to facilitate the journey of London members, it was decided to publish a paragraph as to the train service in the next number of the gazette.

International Central Organisation.—The question of the representation of the B.E.A. at Cracow was discussed, and the attention of Councillors was called to the decisions of the "Administra Komitato" published in the *Oficiala Gazeto* of March. After a general discussion upon the position, it was decided that the election of authorised delegates should take place at the General Meeting in Portrush. For the information of the members of the B.E.A., it was arranged that particulars should be given in THE BRITISH ESPERANTIST, and the following resolution, proposed by Mr. F. M. Sexton and seconded by Mr. Cameron, was carried:—

"That the Editor present in summary or *extenso* the project appearing in the March *Oficiala Gazeto*, and also present a summary of the general position to the next Council meeting."

Guarantors, 1912.

Amount acknowledged in April B.E.	£4,280	Drummond, H. C., Stirling	...	£20	Lely, G. B., Beckenham	...	£10
Bennett, L. C., London	...	Gibson, Fred., Todmorden	...	10	Lockington, A. H., London	...	10
Bicknell, Clarence, Bordighera	...	Grundy, Cuthbert C., Blackpool	...	10	Mather, W. H., Bradford	...	10
Blackham, C. P., Dublin	...	Harris, Charles W., Tunbridge Wells	...	10	Robinson, Lt.-Col. G. S., Eastbourne	...	10
Bons, Miss H. E.	...	Harvey, William, Edinburgh	...	10	Strong, F. J., Coventry	...	20
Board, Miss H. E., London	...	Hill, Clement, St. Leonards-on-Sea	...	10	Wynter, D., London	...	10
Burnley Esperanto Group	...	Honeysett, A., Sutton	...	20			
Campbell, G. W., London	...	Jelley, Geo. Wm., Coventry	...	30			
Dunlaga, J. F., London	...	Johnston, Dr. G. Jameson, Dublin	...	20			
Dougall, Charles S., Dollar	...	Lees, A. H., Evesham	...	10			
					Deduct error in Mr. H. T. Bailey's		4 940
					Guarantee Form (April B.E.)		90
					Total		£4,850

The British Esperanto Association (Incorporated).

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP

EXTRACT FROM RULES.—"If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member."

G. A. C. BADHAM, 3, Clive-street, Calcutta, India; B. G. M. BASKETT, Cobden Club, Broadway-court, Westminster, London, S.W.; F. F. BELL, 17, Soho-street, Islington, Liverpool; J. J. BOUTWOOD, J.P., Holland House, Hastings; J. D. BURNS, 9, Park-street, Dunedin, N.Z.; J. C. CAMERON, 9, India-street, Montross, Scotland; W. J. DRUMMOND, 39, Ormond-road, Moanee Ponds, Vic., Australia; W. S. FULLWOOD, "Etruria," Millett-street, Hurstville, N.S.W., Australia; T. G. HOUSTON, J.P., The Institution, Coleraine; Mrs. J. H. MEGGY, 32, Tulse-hill, London, S.W.; H. MORTIMER, 142, Quay-road, Bridlington; Mrs. J. A. OAKLAND, 51, West-hill-drive, Mansfield; J. H. J. SCHOLEN, Marshall Cottage, Naini-Tal, India; G. SHARPLES, Totok, Celebes, Dutch East Indies; Miss L. SWAN, 136, Pemdeon-road, W. Croydon; G. N. TRAVIS, Elm-grove W., Barnham, near Bognor; Mrs. K. E. TROUNSON, 122, Birchanger-road, South Norwood, S.E.; W. G. WEEKLEY, 78, Upper Aughton-road, Birkdale, Southport.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Misses M. WHITE, *E. MACPHAIL, *J. HARRIS, *A. S. ADAMS, *M. A. G. KING, *A. A. WHITE, *I. F. DICKIE, *V. HUNTER, *B. GORDON, *J. W. LECKIE, *I. SMITH, M. MACLEARN, *I. MCGREGOR, J. MURRAY, *Mr. Wm. SMITH, Edinburgh; *Miss J. C. KNOX, *Miss M. R. McNICOL, *G. ANDERSON, J. B. ANDERSON, *R. BITTLE, *D. MCCracken, Glasgow; D. MASON, Paisley; *Miss B. CHANDLER, Edinburgh; Miss B. R. CASS, Miss M. THOMSON, Miss G. WILLFORD, Hull; *A. E. B. SUDDABY, A. J. TURNER, Withernsea; *Miss L. M. M. LEACH, W. G. MASON, Norwich; *G. K. LEVINGS, Kohstad, Griguland East, S.A.; Miss M. L. HUYER, Krugersdorp, Transvaal.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*Miss A. SUTHERLAND, *ROBERT SMITH, Mrs. G. SENIOR, Miss S. L. WEIR, Edinburgh; W. W. ESAM, Miss L. STAVELEY, Miss L. GOSSLING, Wisbech; Miss L. D. WALLACE, Leith; Mrs. E. M. DE MONTOKO, Glasgow; *G. W. HARE, Uddingston, Scotland; Miss M. TOOVEY, High Wycombe; Rev. Canon AUG. S. STORES, M.A., Wisbech; CARL A. C. UHRLAUB, N. Kensington, S. Australia.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

Bezonata: BRITISH ESPERANTIST, No. 4 (Vol. I.), de S-ro H. D. AKERMAN, 112d, Marlborough-road, Bowes Park, London, N. Kiu havas ekzempleron?

Council Meetings.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council of the B.E.A. will be held on Monday, May 13th, at the Offices of the Association, 133, High Holborn, London, W.C., at 6.30 p.m. The following meeting will take place on Monday, May 27th, at the Town Hall, Portrush, immediately after the Annual General Meeting.

H. OLEGG, Secretary.

Examinations in May.

The Examinations Committee begs to announce that on Monday, May 6, at the offices of the Association, Museum Station-buildings, High Holborn, W.C., will be held an Examination for the Preliminary Certificate, at 7 p.m., and on Tuesday, May 7, an Examination for the Advanced Certificate, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.

Subscriptions, 1912.

Fellows, Members and Affiliated Groups are respectfully informed that subscriptions for the year 1912 became due in every case on the 1st January, 1912.

Owing to the change in the date of the financial year made by the members in June, the past "year" consisted of eight months only. It has, therefore, been decided that members and others renewing for the year ending 31st December, 1912, may do so by paying two-thirds of the full amount of the subscription due.

H. GLEGG, Secretary.

A New Edition of Mr. Harrison Hill's popular song "Esperanto" ("you can buy it for a penny; you can learn it in a week") has just been issued by the B.E.A. Price 1d. nett; by post, 1½d.; 1 doz. by post, 10d.

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (25 spesdekojn) por trilinea enpresaĵo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu enpresaĵon senpage. *Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.*

34. Cambridge (Anglujo).—S-ro C. McPherson, 60, Devonshire-road, deziras korespondi kun alilandaj samideanoj postkarte aŭ letere, kaj interŝangi poŝtmarkojn britajn aŭ alilandajn.

88. Madagascar, Afriko.—S-ro Razafimahandry, lernanto en la regiona lernejo, Ambositara, deziras koresp. kun alilandaj samideanoj per il. pkarto.

89. Amiens (Somme), Francujo.—S-ro Edmond Payen, 26, rue St. Honoré, dez. koresp. per il. pk. rto) pm. bidflanke.

90. Sheffield, Anglujo.—S-ro G. W. Roome, F.B.E.A., 214, Psalter-lane, deziras (1) korespondi, letere aŭ pkarte, kun koloniaj samideanoj, pri naturscienco, aŭ (2) interŝangi poŝtajn tutaĵojn.

91. Edinburgh, Skotlando.—La Skota Ligo de Katolikaj Esperantistoj, 38, India-place, dez. koresp. kun gekatolikoj en aliaj landoj.

92. Novjorko, Usono.—S-ro R. W. Powell, 82, Fulton-street, dez. koresp. kun Bahaja Esperantisto kun la celo proksimigi la du movadojn.

93. Ba Brita Kongreso.—S-ino N. F. Smith, Hawththorne, Hindhead, Surrey, deziras vojaĝi kun samideanoj. al Londono al la 5a Brita Kongreso. Logos unuaklase kaj restos por Dublina postkongreso.

94. Portsmouth, Anglujo.—S-ro P. Mills, 16, Clifton-street, dez. interŝangi p.kartojn ilustr. kun gesam. ŝulandaj. Ĉiam tuj resp.

95. Dekkvarjara knabino deziras samaĝan alilandan korespondanton. Sin turnu al Pastro L. A. Long, Rothbury, Anglujo.

96. Pri infana vivo en ĉiuj landoj deziras korespondi S-ro Max Nicholls, Slatu Lernejo, Saltwater River, Tas. Pen, Tasmania. Ĉiam respondos letere.

97. Edinburgo, Skotujo.—S-ro M. Heron, 38, India-place, interŝangas il. pkartojn kun gekatolikoj de diversaj nacioj. Ĉiam respondos.

98. Hamborn-Neumühl, Rejnlando, Germanujo.—S-ro Ignac Tuma, oficisto-bohemo, Alexstr. 56, deziras korespondi kun alilandaj samideanoj. Ĉiam respondos. (90).

99. Leeds, Anglujo.—S-ro H. Rusby, 16, Maud-woolue, Beeston-hill, dez. koresp. aŭ letere aŭ pkarte kun alilanduloj. Ĉiam resp.

100. Bojovini, Aŭstrio.—Fino Zofia Stadler, Wienitz, dez. interŝangi il. pk. kaj ĵurnalojn kun alilanduloj.

101. Articlave N S (Co. Derry), Irlando.—S-ro H. E. Thompson deziras korespondi kun alilanduloj.

102. Frankfurt-am-Main, Germanujo.—S-ro R. Meyer, Rödelheimer-landstr. 24, deziras interŝangi p.kojn, pkartojn il. kaj gazetojn. Resp. tuj.—S-ro Kari Naber, Rothehofstr. 28, dez. ricevi kuriozaĵojn de ĉia regno, naciajn kostumarkojn, gazetojn aŭ leterojn. Rekompeacos laŭ deziro, esceptinte per p.mkoj.

103. Bilbao, Hispanujo.—S-ro Asensio Linacero, Calle Ascao, 3-3, deziras korespondadi per il. pkartojn kun gesam. el ĉiuj landoj.

104. Glasgovo, Skotlando.—S-ro Boyd Anderson, 4, Belmont-crescent, dez. koresp. per il. pkartojn kaj leterojn kun alilanduloj. Ĉiam nepre respondos.

105. Londono, Anglujo.—S-ro H. H. Newbold, presisto, 42, Larkbere-road, Sydenham, S.E., dez. interŝ. il. p.k. kun ĉiulandaj geesp.

106. Glasgovo, Skotlando.—Fino S. Phillips, 29, Melville-street, dez. korespondi kun alilandulinoj per il. pk. Nepre ĉiam respondos.